La Rapid-skribado



Jen la densigita esperanta informo pri tiu ĉi rapid-skribado, ankaŭ konata kiel “fono-stenografio” kaj/aŭ “fraz-grafio”. La oficialaj fontoj , por verki tiun ĉi broŝuron estas:

1) **La libro de Olga Aleksandrova (rusa versio)**.

https://sovietime.ru/russkij-yazyk/fonostenografiya-1968?highlight=WyJcdTA0NDRcdTA0M2VcdTA0M2RcdTA0M2VcdTA0NDFcdTA0NDJcdTA0MzVcdTA0M2RcdTA0M2VcdTA0MzNcdTA0NDBcdTA0MzBcdTA0NDRcdTA0MzhcdTA0NGYiXQ==

https://sovietime.ru/russkij-yazyk/fonostenografiya-ili-slukhovaya-skoropis-1958?highlight=WyJcdTA0NDRcdTA0M2VcdTA0M2RcdTA0M2VcdTA0NDFcdTA0NDJcdTA0MzVcdTA0M2RcdTA0M2VcdTA0MzNcdTA0NDBcdTA0MzBcdTA0NDRcdTA0MzhcdTA0NGYiXQ==

2) **La oficiala ttt-paĝo de V.A. Sukhoveyev** http://fonostenograf.narod.ru/

3) **La oficiala ttt-paĝo de Sergey Lebedev** http://sirserge.altai.info/

Verŝajne, vi tre ŝatas takigrafion, stenografion kaj similajn metodojn por rapida skribado. Jen unu el la plej bonaj, relative facile-lernebla. Tiu ĉi metodo baziĝas sur “fono-signoj” , kiuj fakte NE estas literoj. (kvankam la bazaj fono-signoj havas rilatojn kun niaj jam, tre konataj, tradiciaj literoj, uzataj en Esperanto).

Jen la bazaj fonosignoj:





Kaj jen, la “EMBLEMO” de la fraz-grafio . Vi vidos ke ĉiuj signoj estas reprezentitaj en ĝi:



Klarigoj:

1) Vertikala ĉefa streko
2) vertikala supra streketo
3) vertikala malsupra steketo
4) rond-forma supra linio (ĉiam maldekre!!)
5) rond-forma malsupra linio (ĉiam dekstre!!)
6) oblikva supra linio (ĉiam dekstre !!)
7) oblikva malsupra linio (ĉiam maldekstre !!)

Pere de tiu ĉi simpla klarigo, vi povas vidi ke, neniam povas ekzisti aliaj pozicioj, je la momento de skribado.

Mezuro: La koncepto “mezuro” dependos de ĉiu persono. Sufiĉas skribi la literon “a” , aŭ “i” , sur iu ajn papero, kaj vi trovos vian propran “relativan mezur-unuon”. Ĝenerale, ĝi estas inter 4 kaj 5 milimetroj.



Inter la kontrol-linio kaj la ĉef-linio, ni povas imagi la jenajn cirklojn, por faciligi la dezegnadon:



Tiamaniere, vi povos dezegni la simbolojn, per tiuj ĉi subaj (individuaj) partoj, de ĉiu fono-signo. Bv atenti ke, vi ĉiam dezegnos la fono-signojn de **<u>supre al sube</u>** (bv rigardi la sagon, kiu montras la skrib-direkton). Escepto: la rond-forman fono-signoj: “r” kaj “l”, kiuj havas liberan direkton.






vertikala supra
streketo


oblikva supra
streko

oblikva malsupra
streko


vertikala malsupra
streketo


malsupra
rond-linio

Se temas pri pli altaj fono-signoj , vi devas pensi pri “tri ŝtupa-cirkloj”:



Jen la fono-signoj adaptitaj al la lingvo ESPERANTO:



Unu el la avantaĝoj de tiu ĉi sistemo, estas la ebleco, kunligi/unuecigi/kunfandigi/fuziigi la fonosignojn. Jen tabelo kiu montras la fuziiĝon de du fono-signoj. Eblas fari pli da fuziiĝoj.
La tabelo estis farita surbaze de statistikaj oftecoj de la koncernaj esperantaj literoj:



Regulo de s-ro Miĥail Terne

Tiu ĉi regulo montras la pozicion de la fono-signo kaj ĝian akompanan ne-skribitan vokalon. Dank´ al tiu regulo, ni ŝparos 50% da skribado, ĉar la vokaloj aperos laŭ la koncerna pozicio.



Kelkaj ekzemploj:

Finfine, vi povas vidi ke la ĉef-linio estas grava, kaj ankaŭ la supra signalo estas grava (laŭ la regulo de Terne). Tiamaniere, vi rapide legos , pri kiu(j) vokalo(j) aŭ fonemo(j) temas.

<u>Konekto-linioj:</u> Inter literoj-> pli ampleksa ol 45°
Inter vortoj -> malpli ampleksa ol 45 °



<u>Klarigo:</u> La fono-signoj maŝin-presitaj estas pli “rektaj” ol la fono-signoj skribitaj per la mano. Ankaŭ, tiuj ĉi lastaj estas iomete klinigitaj. Tio okazas, pro la natura kondiĉo de la mano kiu skribas.

La fono-signoj povas esti “inversigitaj”. Sufiĉas meti la inversigan signon (streketo en la malsupra parto !!).



Jen diversaj manieroj por skribi la streketon.

La fono-signoj povas esti “mildigitaj”. Sufiĉas meti “mildigo-signon”. Tiamaniere, aperos speco de paŭzo, inter la konsonanto kaj la vokalo. Mildigo-signo temas pri “buklo”, ĉe la malsupra parto de la f-signo.



Diversaj manieroj por dezegni la “buklon”.

En Esperanto, la plej uzata buklo-signo estas por la litero “h” , “H”.

Pere de tiu ĉi buklo-signo, ni faras la fono-signon por nia esperanta litero “H”. Eble , ĝi estos la sola buklo-signo en E-o.

Tiu buklo-fono-signo mildigas la sonon de nia E-o litero “Ĥ”.

Vokaloj: Kiam vi ne sukcesas trovi la ĝustan signo-kombinon, vi rajtos uzi apartajn vokalojn. Jen ili:



Sen-vokala regiono: Kelkfoje, la fono-signo ne estas akompanata de vokalo. Do , vi rajtos skribi ilin, en la sen-vokala regiono. Tiamaniere, nur la sonoj de la konsonantoj estos aŭdeblaj.

Kontrol-linio ----------> - - - - - - - - - - - - - - - - - - -
ĉef-linio ----------> ----------
mal-supra kontrol-linio -> - - - - - - - - - - - - - - - - - - -
Sen-vokala regiono --->

Ni verkis tiun ĉi broŝuron por la esperantista publiko. Vi rajtas traduki ĝin en via gepatra lingvo kaj disvastigi Frazgrafion inter viaj geamikoj.
Se vi deziras pli da informoj, bv elŝuti la senpagan libron de Serge:

http://sirserge.altai.info/articles/?id=83

Ĝi estas 28,8 Mb. estas en versio PDF, kaj en la rusa lingvo.

Eble, vi bezonos uzi aŭtomatan trakukilon kiel https://translate.google.com/
kaj traduki la dokumenton al via gepatra lingvo. Kompreneble, la fina rezulto enhavos traduk-erarojn, ĉar temas pri maŝino por (malbona?) tradukado.

La Espero

En la mondon venis nova sento ,

tra la mondo iras forta voko ;



per flugiloj de facila vento



nun de loko flugu ĝi al loko .



Ne al glavo sangon soifanta

ĝi la homan tiras familion :



al la mond' eterne militanta



ĝi promesas sanktan harmonion.



Sub la sankta signo de l' espero



kolektiĝas pacaj batalantoj ,



kaj rapide kreskas la afero



per laboro de la esperantoj .



Forte staras muroj de miljaroj



inter la popoloj dividitaj;



sed dissaltos la obstinaj baroj,



per la sankta amo disbatitaj.



Sur neŭtrala lingva fundamento,



komprenante unu la alian,



la popoloj faros en konsento



unu grandan rondon familian.



Nia diligenta kolegaro



en laboro paca ne laciĝos,



ĝis la bela sonĝo de l' homaro



por eterna ben' efektiviĝos.



<u>Klarigo:</u> Tiu ĉi broŝuro ne pretendas esti “baza kurso pri fonostenografio”. Ĝi nur celas prezenti la sistemon al vi, kaj, se vi volas lerni ĝin, vi devos viziti la ĉi supre menciitajn ttt-paĝojn, kaj eventuale uzi la “aŭtomatan traduk-eblecojn” de via krozilo, ĉar la enhavo kutimas esti en la rusa lingvo.

Korcagin cirkauprenis la kapon per la manoj kaj penige enpensigis. Antaŭliaj okuloj preterpasis la tuta lia vivo, de l'infaneco gis la lastaj tagoj. Ĉu bone, ĉu malbone, li travivis siajn dudek kvar jarojn? Reprenante en la memoro jaron post jaro, kontrolis sian vivon, kiel objektiva jugisto, kaj kun la profunda kontento solvis, ke la vivo estas travivita ne tro malbone. Sed estis ankaŭ eraroj, faritaj pro la stulteco, pro la juneco, sed pli multe pro la malscio. La plej grava — li ne transdormis varmegajn tagoin, trovis sian lokon en la fera batalo por la registaro, kaj sur sangruga standardo de la revolucio estas ankaŭ siaj kelkaj gutoj da sango.

N. Ostrovskij, Kiel hartis stalo

Esperanta-teksto eltrančita el la libro de O. Aleksandrova , paĝo 98



Dankon pro via pacienco.

Prof. Ruben Sánchez - rubensan15@gmail.com